TEJO-aktuale: numero 210, 2009-01

### Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio

La 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en urbo Liberec' en Ĉeĥio. "Liberec'" rolos ankaŭ kiel kongresa temo - libereco en ĉiuj ties formoj. La aranĝon organizas kune Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj. Urbo Liberec situas 100 km norde de Prago, apud la ĉeĥa-germana-pola trilandlimo. Jam eblas rete aliĝi al IJK 2009 en Liberec'! Unua aliĝperiodo daŭras ĝis la 31-a de januaro, do rapidu! Uzu la kutiman retadreson: http://www.tejo.org/ijk/

### JES! IS kaj AS finfine kune! 27.12.2009 – 3.1.2010, Zakopane, Pollando

Ago-Semajno kaj Internacia Seminario finfine kuniĝas - tian informon dum novjara nokto ricevis partoprenantoj de ambaŭ junularaj aranĝoj. Anonco pri kreo de Junulara E-Semajno estis publikigita filme ( http://filmo.jes.pej.pl ) duonhoron post noktomezo. La unua JES okazos en Zakopane (Pollando). JES-paĝaro ( http://jes.pej.pl ) estas ankoraŭ konstruata, do plej multaj informoj pri nova aranĝo troviĝas en Vikipedio ( http://eo.wikipedia.org/wiki/Junulara_E-Semajno ) La silvestro de 2009 vidos kunigon de IS kaj AS, du fortaj kaj sukcesaj eventoj kiuj ĝis nun konkurencis. Ĝi okazos en Zakopane, nomiĝos Junulara E-Semajno kaj gvidos ĝin teamo de kvar spertuloj de ambaŭ pasintaj eventoj: Julia Hell (prezidantino de GEJ), Łukasz Żebrowski (prezidanto de PEJ), Rolf Fantom (estrarano de GEJ por renkontiĝoj), Irek Bobrzak (ĉefo de Varsovia Vento). Pliaj informoj: http://tejo.org/eo/node/845

### Formularo por registriĝi en PS 2.0

Kiel en ĉiuj sociaj retejoj, unue la homoj devas esti registritaj en la paĝaro kaj aldoni iliajn datumojn (nomon, familian nomon, aĝon, preferencojn, bildojn, ktp.). Ĉi-semajnfine Joop kaj mi studas tion en Benicàssim kaj tie estas la unua propono de tia formularo por registro en la projekto Pasporta Servo 2.0. Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/847

### Rekotizu por 2009!

Jam venis la tempo (re)membriĝi en TEJO/UEA por 2009! Profitu de la avantaĝoj, kiujn donas TEJO-membreco kaj ricevu la novan jarlibron kaj novajn numerojn de Kontakto kaj TEJO-tutmonde. Vi havos ankaŭ pli prezfavoran aliĝon al diversaj eventoj, inkluzive IJK, IS kaj AS, do hastu! Vi povas tion rekte fari en la http://www.uea.org/alighoj/index.html. Ni antaŭĝojas vidi vin kiel membron en la estontaj renkontiĝoj!

### KONTRIBUU AL TEJO-TUTMONDE

Ĉu vi faris, faras aŭ faros iun gravan agadon por Esperanto, kaj ŝatus informi pri tio? Aŭ ĉu vi ĉeestis interesan Esperanto-aranĝon, pri kiu indas raporti al aliaj? Aŭ ĉu vi volas anonci pri iu okazonta junulara Esperanto-aranĝo? En ĉiuj ĉi kazoj, oni invitas vin kontribui al TEJO Tutmonde. TEJO Tutmonde estas la oficiala pri-movada gazeto de TEJO, kaj ĝin ricevas ĉiuj TEJO-anoj. Ĝi akceptas ĉiujn kontribuojn, kiuj rilatas al la Esperanto-movado, kun prefero al la junulara Esperanto-movado. Sendu viajn kontribuojn al tejo-tutmonde(ĉe)tejo.org.

### VIA KONTRIBUO POVUS ESTI ĈI TIE

Ĉu vi malkontentas ke ofte ripetiĝas anoncoj en TA? Kiu kulpas? ... VI, la LEGANTOJ! TA povas esti nur tiel bona kiel viaj kontribuoj. Sendu raportojn pri agado en via regiono, okazontaj eventoj, k.s. Necesas nur konciza unu-alinea teksteto. La redakcio atendas viajn kontribuojn!

### KONTRIBUU AL KONTAKTO

Kutime ĉiu numero de Kontakto havas sian temon, aŭ emfazon, sed en ĉiu numero publikiĝas ankaŭ alitemaj materialoj. La temoj de Kontakto 2009 estas: 2009:1. Superstiĉoj, mitoj kaj popolaj kredoj. Limdato 15a decembro.

### Planu vian Esperantan Someron!

Post KEF kaj antaŭ IJK okazos antaŭkongreso en Vieno, trajna karavano el Francio kaj bicikla el Szczecin (Pollando). Poste okazos karavano al la UK en Bjalistoko, kiun sekvos MIRO en Kroatio kaj FESTO en Germanio proksime al la landlimo de Francio.

### BEMI karavano al IJK 2009 en Liberec, unua informilo

Tradicie BEMI organizas karavanon al IJK. Dum pasinta IJK la BEMI kunsido rapide konkludis ke la plej taŭga itinero al loko de IJK 2009, Liberec, estis itinero startante en Norda-Pollando sekvante la riverojn Odro kaj Neisso. La Pola urbo Szczecin estas bone atingebla el diversaj regionoj de Eŭropo. Laŭ la Germana flanko de riveroj Odro kaj Neisso
situas inditan biciklan itineron 'Oder-Neisse-Radweg'. La tuta itinero inter Sczecin kaj Liberec sekvante la riverojn estas 450km-oj longa.La plano estas starti nian karavanon en Szczecin unu semajno antaŭ IJK, dimanĉe la 12an aŭ lunde la 13an de julio. Pliaj informoj: Ivo Miesen <ivo_m ĉe dds.nl> kaj en la BEMI-yahoogroup: Aliĝo al Yahoogroups listo eblas per sendado de malplena mesaĝo al BEMI-subscribe ĉe Yahoogroups.com.

### Venontaj renkontiĝoj

50-a IFES/1-a VIFES rodica_todor ĉe yahoo.com; <br> Internacia Himalaja Renkontiĝo, en Anapurna, Nepalo (26a de februaro ĝis 3a de marto 2009) http://tejo.org/eo/node/830; <br> 2-a Mezorienta Kunveno, de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo, 2009 (İznik, Turkio) http://tejo.org/eo/node/842; <br> 5a Ibera Renkontiĝo en Oporto, Portugalio (de la 6a ĝis la 8a de marto 2009) http://tejo.org/eo/node/839; <br> Germana Esperanto-Kongreso kaj 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso, Pentekosto 2009 (Herzberg am Harz, Germanio) http://tejo.org/eo/node/821; <br> 94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787; <br> Printempa Seminario Internacia (PSI) / PLI, 10. aprilo – 17. aprilo 2009, St. Andreasberg, Germanio http://tejo.org/eo/node/727; <br>

### Kolokvo

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĉiu povas aboni ĝin senpage. Ĝi aperas sufiĉe ofte kaj enhavas nur koncizajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligojn al interesaj retpaĝoj. Se vi havas iun interesan novaĵon kaj volas, ke ĝi aperu en TA, sendu ĝin al tejo-aktuale ĉe tejo.org. Ekzistas multe da paperaj revuoj, el kiuj oni povas ĉerpi diversajn informojn. Sed ofte okazas tiel, ke novaĵoj aperas lastminute kaj necesas ke aliaj homoj estu rapide informitaj pri ili. Paperaj eldonoj en tiaj kazoj ne helpas, ĉar ili tro malrapidas. Pro tio TEJO decidis krei ankoraŭ unu servon, pere de kiu ĉiuj novaĵoj povu rapide atingi siajn celojn. <br>

Oficiala retpaĝo de TEJO-aktuale: http://www.tejo.org/ta <br>

Redaktorino: Julia NOE, Germanio, tejo-aktuale ĉe tejo.org <br>

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), http://www.tejo.org <br>

Limdatoj por kontribuoj: 1a kaj 3a dimanĉo en la monato <br>

Retpoŝta abono: http://www.uea.org/retlistoj <br>

### Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio

La 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2009 en urbo Liberec' en Ĉeĥio. "Liberec'" rolos ankaŭ kiel kongresa temo - libereco en ĉiuj ties formoj. La aranĝon organizas kune Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj. Urbo Liberec situas 100 km norde de Prago, apud la ĉeĥa-germana-pola trilandlimo. Jam eblas rete aliĝi al IJK 2009 en Liberec'! Unua aliĝperiodo daŭras ĝis la 31-a de januaro, do rapidu! Uzu la kutiman retadreson: http://www.tejo.org/ijk/

### JES! IS kaj AS finfine kune! 27.12.2009 – 3.1.2010, Zakopane, Pollando

Ago-Semajno kaj Internacia Seminario finfine kuniĝas - tian informon dum novjara nokto ricevis partoprenantoj de ambaŭ junularaj aranĝoj. Anonco pri kreo de Junulara E-Semajno estis publikigita filme ( http://filmo.jes.pej.pl ) duonhoron post noktomezo. La unua JES okazos en Zakopane (Pollando). JES-paĝaro ( http://jes.pej.pl ) estas ankoraŭ konstruata, do plej multaj informoj pri nova aranĝo troviĝas en Vikipedio ( http://eo.wikipedia.org/wiki/Junulara_E-Semajno ) La silvestro de 2009 vidos kunigon de IS kaj AS, du fortaj kaj sukcesaj eventoj kiuj ĝis nun konkurencis. Ĝi okazos en Zakopane, nomiĝos Junulara E-Semajno kaj gvidos ĝin teamo de kvar spertuloj de ambaŭ pasintaj eventoj: Julia Hell (prezidantino de GEJ), Łukasz Żebrowski (prezidanto de PEJ), Rolf Fantom (estrarano de GEJ por renkontiĝoj), Irek Bobrzak (ĉefo de Varsovia Vento). Pliaj informoj: http://tejo.org/eo/node/845

### Formularo por registriĝi en PS 2.0

Kiel en ĉiuj sociaj retejoj, unue la homoj devas esti registritaj en la paĝaro kaj aldoni iliajn datumojn (nomon, familian nomon, aĝon, preferencojn, bildojn, ktp.). Ĉi-semajnfine Joop kaj mi studas tion en Benicàssim kaj tie estas la unua propono de tia formularo por registro en la projekto Pasporta Servo 2.0. Pliaj informoj: http://www.tejo.org/eo/node/847

### Rekotizu por 2009!

Jam venis la tempo (re)membriĝi en TEJO/UEA por 2009! Profitu de la avantaĝoj, kiujn donas TEJO-membreco kaj ricevu la novan jarlibron kaj novajn numerojn de Kontakto kaj TEJO-tutmonde. Vi havos ankaŭ pli prezfavoran aliĝon al diversaj eventoj, inkluzive IJK, IS kaj AS, do hastu! Vi povas tion rekte fari en la http://www.uea.org/alighoj/index.html. Ni antaŭĝojas vidi vin kiel membron en la estontaj renkontiĝoj!

### KONTRIBUU AL TEJO-TUTMONDE

Ĉu vi faris, faras aŭ faros iun gravan agadon por Esperanto, kaj ŝatus informi pri tio? Aŭ ĉu vi ĉeestis interesan Esperanto-aranĝon, pri kiu indas raporti al aliaj? Aŭ ĉu vi volas anonci pri iu okazonta junulara Esperanto-aranĝo? En ĉiuj ĉi kazoj, oni invitas vin kontribui al TEJO Tutmonde. TEJO Tutmonde estas la oficiala pri-movada gazeto de TEJO, kaj ĝin ricevas ĉiuj TEJO-anoj. Ĝi akceptas ĉiujn kontribuojn, kiuj rilatas al la Esperanto-movado, kun prefero al la junulara Esperanto-movado. Sendu viajn kontribuojn al tejo-tutmonde(ĉe)tejo.org.

### VIA KONTRIBUO POVUS ESTI ĈI TIE

Ĉu vi malkontentas ke ofte ripetiĝas anoncoj en TA? Kiu kulpas? ... VI, la LEGANTOJ! TA povas esti nur tiel bona kiel viaj kontribuoj. Sendu raportojn pri agado en via regiono, okazontaj eventoj, k.s. Necesas nur konciza unu-alinea teksteto. La redakcio atendas viajn kontribuojn!

### KONTRIBUU AL KONTAKTO

Kutime ĉiu numero de Kontakto havas sian temon, aŭ emfazon, sed en ĉiu numero publikiĝas ankaŭ alitemaj materialoj. La temoj de Kontakto 2009 estas: 2009:1. Superstiĉoj, mitoj kaj popolaj kredoj. Limdato 15a decembro.

### Planu vian Esperantan Someron!

Post KEF kaj antaŭ IJK okazos antaŭkongreso en Vieno, trajna karavano el Francio kaj bicikla el Szczecin (Pollando). Poste okazos karavano al la UK en Bjalistoko, kiun sekvos MIRO en Kroatio kaj FESTO en Germanio proksime al la landlimo de Francio.

### BEMI karavano al IJK 2009 en Liberec, unua informilo

Tradicie BEMI organizas karavanon al IJK. Dum pasinta IJK la BEMI kunsido rapide konkludis ke la plej taŭga itinero al loko de IJK 2009, Liberec, estis itinero startante en Norda-Pollando sekvante la riverojn Odro kaj Neisso. La Pola urbo Szczecin estas bone atingebla el diversaj regionoj de Eŭropo. Laŭ la Germana flanko de riveroj Odro kaj Neisso
situas inditan biciklan itineron 'Oder-Neisse-Radweg'. La tuta itinero inter Sczecin kaj Liberec sekvante la riverojn estas 450km-oj longa.La plano estas starti nian karavanon en Szczecin unu semajno antaŭ IJK, dimanĉe la 12an aŭ lunde la 13an de julio. Pliaj informoj: Ivo Miesen <ivo_m ĉe dds.nl> kaj en la BEMI-yahoogroup: Aliĝo al Yahoogroups listo eblas per sendado de malplena mesaĝo al BEMI-subscribe ĉe Yahoogroups.com.

### Venontaj renkontiĝoj

50-a IFES/1-a VIFES rodica_todor ĉe yahoo.com; <br> Internacia Himalaja Renkontiĝo, en Anapurna, Nepalo (26a de februaro ĝis 3a de marto 2009) http://tejo.org/eo/node/830; <br> 2-a Mezorienta Kunveno, de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo, 2009 (İznik, Turkio) http://tejo.org/eo/node/842; <br> 5a Ibera Renkontiĝo en Oporto, Portugalio (de la 6a ĝis la 8a de marto 2009) http://tejo.org/eo/node/839; <br> Germana Esperanto-Kongreso kaj 8a Eŭropa Esperanto-Kongreso, Pentekosto 2009 (Herzberg am Harz, Germanio) http://tejo.org/eo/node/821; <br> 94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787; <br> Printempa Seminario Internacia (PSI) / PLI, 10. aprilo – 17. aprilo 2009, St. Andreasberg, Germanio http://tejo.org/eo/node/727; <br>

### Kolokvo

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĉiu povas aboni ĝin senpage. Ĝi aperas sufiĉe ofte kaj enhavas nur koncizajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligojn al interesaj retpaĝoj. Se vi havas iun interesan novaĵon kaj volas, ke ĝi aperu en TA, sendu ĝin al tejo-aktuale ĉe tejo.org. Ekzistas multe da paperaj revuoj, el kiuj oni povas ĉerpi diversajn informojn. Sed ofte okazas tiel, ke novaĵoj aperas lastminute kaj necesas ke aliaj homoj estu rapide informitaj pri ili. Paperaj eldonoj en tiaj kazoj ne helpas, ĉar ili tro malrapidas. Pro tio TEJO decidis krei ankoraŭ unu servon, pere de kiu ĉiuj novaĵoj povu rapide atingi siajn celojn. <br>

Oficiala retpaĝo de TEJO-aktuale: http://www.tejo.org/ta <br>

Redaktorino: Julia NOE, Germanio, tejo-aktuale ĉe tejo.org <br>

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), http://www.tejo.org <br>

Limdatoj por kontribuoj: 1a kaj 3a dimanĉo en la monato <br>

Retpoŝta abono: http://www.uea.org/retlistoj <br>